BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

CGC Nº
00406 604/0001-06

PROPRA SIDEJO:
Ed. Jockey Club, sala 103
70.300 - Brasília - DF
Tel.: (061) 226-1298
Caixa Postal 07-1182

1887-1987
Centjara jubileo de Esperanto

SEPT. - OKT./1985 N-ro-90 INFORMA BULTENO

## ANKORAŬ PRI UNUIĜO

NI DEVAS RAPORTI AL LA ESPERANTISTARO PRI LA TRE GRAVAJ LASTAJ OKAZAĴOJ, KIUJ FIRME ANTAŬENIGAS LA KAMPANJON POR KUNFANDIĜO BEL+BKE.

1) LA MEMBRARO *DE BKE* JAM VOĈDONAS PERLETERE — ĜIS LA 14ª/DECEMBRO, KIAM OKAZOS OFICIALE LA ĜENERALA KUNSIDO POR APROBI LA KUNFANDIĜON, KIU TAMEN NUR EFEKTIVIĜOS POST ĈIUJ NECESAJ LAŬLEĜAJ PAŜOJ AMBAŬFLANKE.

2) EN LA 26ª/OKTOBRO LA ĜENERALA KUNSIDO *DE BEL* APROBIS REGULARON POR LA ELEKTO DE ĜIA ESTRARO EN LA 7ª/DECEMBRO. PREZENTIĜIS UNU SOLA KANDIDATARO KUN LA NOMO "PORKUNFANDIĜA"; SEKVE ĜI NEPRE KONSISTIGOS LA NOVAN ESTRARON DE LA LIGO. SED LA KUNFANDIĜO DEVOS OKAZI SUB JENAJ KONDIĈOJ: A) LA NOMO RESTOS BRAZILA ESPERANTO-LIGO; B) ĈEFA SIDEJO EN BRASILIA KAJ SEKCIA EN RIO; C) NOVAJ STATUTO KAJ STRUKTURO.

3) SEKVE LA NOVA BEL-ESTRARO ESTOS PORTEMPA LAŬ LA SEKVANTA PLATFORMO:

I) *ĜIS LA 31ª/JANUARO* - OKAZIGI ĜENERALAN KUNSIDON *DE BEL* POR APROBI LA KUNFANDIĜON.

II) *ĜIS LA 28ª/FEBRUARO* - PREZENTI ANTAŬPROJEKTON DE STATUTO.

III) *ĜIS LA 30ª/APRILO* - KOMISII AL LA KONSULTIĜA KONSILANTARO DE LA LIGO LA FINREDAKTADON DE LA NOVA STATUTO.

IV) *ĜIS LA 30ª/MAJO* - SUBMETI AL LA INDIVIDUAJ MEMBROJ DE AMBAŬ BEL/BKE (LAŬ KOMUNA LISTO) LA APROBON DE TIU STATUTO.

V) *ĜIS LA 30ª/JUNIO* - AKCEPTI NOMARON DE KANDIDATOJ POR LA ESTRARO DE LA NOVA ORGANIZAĴO LAŬ LA STATUTO APROBITA.

NU, EN JULIO/86, DUM LA 22ª NACIA KONGRESO, EN KURITIBO, ESTOS ĈIO PRETA POR OFICIALE FONDI LA NOVAN ORGANIZAĴON, ELEKTI KAJ ENPOSTENIGI TIES ESTRARON.

# KAMPOGRANDO REESPERANTISTIĜAS

La bela kaj moderna urbo Kampogrando, ĉefurbo de la ŝtato Suda-Matogroso, kun ĉirkaŭ 500.000 enloĝantoj, jam havas tradicion pri Esperanto, sed lastatempe la tiea movado iom stagnas.




Tie funkcias "Escola Zamenhof" (apuda foto), fondita de s-ro Onezimo Costa Faria nun loĝanta en Belorizonto; tie instruis Esperanton Kolonelo Fernando Marinho, kiam li kiel leŭtenanto komencis sian karieron, kaj tie naskiĝis la gravaj esperantistoj: D-ro Alberto da Cruz Bonfim (forpasinta, kunfondinto de E-Asocio de Brasília) kaj Generalo D-ro Chersoneso Galvão, Prezidanto de Esperantista Asocio de Rio de Janeiro.

Oni decidis okazigi tie eventon similan al tiuj de Brasilia kaj Rio-de-Ĵanejro nomatan "Spiritista Esperantista Semajno", en la periodo 21ª/29ª de septembro, kaj invitis la prezidanton de BKE — Nelson Pereira de Souza, kiu tiam gvidis unu semajnan kurson kaj prelegis ĉe 14 centroj. Estis granda sukceso, ĉar ricevis kursfinan ateston 55 novaj geesperantistoj, fondiĝis Societo Esperanta de Mato Grosso do Sul (provizora adreso: Rua 15 de Novembro, 230 Apt. 55 — 79100 Campo Grande-MS) kaj revigliĝis E-Grupo "Nova Lumo" (C. Postal 883 — 79100 Campo Grande-MS).

La kursintoj tre deziras korespondi kun eksterlando, kaj estas petate ke oni sendu ĉiuspecan materialon al la novaj organizaĵoj por helpi la restarigon de la tiea Movado.

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

**Honoraj Prezidantoj**
Francisco de Souza Almada (Av. Bern. de Campos, 624, Ap 72, BR 11100 - Santos - SP).
Carlos A. S. da Cunha (Alameda dos Maruás, 471, BR 04068 — S. Paulo-SP).

**Estraro (1985/87)**
Prezidanto - Nelson Pereira de Souza
Tel.: 242-5211 (061)
Vicprezidanto - Elvira Fontes (Caixa Postal 5.888, CEP 01000 - S. Paulo-SP).
Sekretario - Ludimar Azevedo da Silva
Tel.: 562-8904 (061)
Kasisto - José Carlos Dorini Ramos
Tel.: 577-2214 (061)
Kulturaj Aferoj - Dro Paulo Vieira da Silva
Tel.: 553-1365 (061)

**Informa Bulteno**
Ricevas ĝin senpage la Membroj kaj ĉiu, kiu faras donacon almenaŭ unufoje en la jaro.
Ĉefredaktoro
Nelson P. de Souza
Kunlaboraĵoj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

# Brazilaj Novaĵoj

**AMAZONO (AM)**

● NOVA E-ASOCIO (a/c Secr. Mun. Educação e Cultura — 69735 Presidente Figueiredo-AM) estas ĵus fondita, kies Prezidanto estas Prof. Severino Felisberto de Santana kaj Vic-Prez. D-ro Paulo Loubet.

**BAHIO (BA)**

● DUA REGIONA RENKONTIĜO okazis en la tagoj 12ª/13ª de oktobro, en la urbo Muritiba (BA), kun tre bona kaj varia programo. Gratulon al la Komitato: Prez. Manoel Borges dos Santos, Sekr. Pastoro José Olimpio, Kas. Evandro M. de Andrade, kaj al la iniciatintoj — Societo Esperanto de Salvador!

**CEARAO (CE)**

● ASSOCIAÇÃO CEARENSE DE Eo (C. Postal 1221 — 60001 Fortaleza-CE) disvendas belan leterpaperon. Petu informojn.

**FEDERACIA DISTRIKTO (DF)**

● E-ASOCIO DE BRASILIA (C. Postal 11-1124 — 70084 Brasilia-DF) okazigos en la 13ª/17ª de januaro/86 Kurson pri Kompara Lingvistiko E-Port., gvidata de D-ro Roberto Passos Nogueira.

● O PRECEPTOR (C. Postal 12-2612 — 70000 Brasília-DF) oficiala organo de la framasona organizaĵo Grande Oriente do Brasil publikiĝis en sia N-ro 3 tradukon de la ĉefartikolo al Esperanto, krom la angla, franca kaj hispana.

**PARAO (PA)**

● TRIBUNA LIVRE (C. Postal 975 — 66000 Belém-PA). Ĝi mem sin anoncas: movada informa kaj socikultura, sed ĉefe pri proponoj fari ŝanĝojn en Esperanto.

**RIO DE ĴANEJRO (RJ)**

● FUNDAÇÃO GETÚLIO VARGAS (Praia do Botafogo, 190 — 22250 — R. Janeiro-RJ) — grava altlernejo ĉefe por geoficistoj ĉe ŝtataj kaj privataj entreprenoj, kie Prof. Sylla Chaves estas instruisto, organizas novan E-kurson: 5-7/novembro.

● BRAZILA E-LIGO (Praça da República, 54, 2º — 20211 R. Janeiro-RJ) okazigos ĝeneralan kunsidon por elekti novan Estraron, en la 7ª/decembro.

● D-ro JOAQUIM DO COUTO (R. Casimiro de Abreu, 29 - Ingá 24210 Niterói-RJ) donacis 2 ekzemplerojn de la tre interesa "Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto". Koran dankon!

● AERJ — ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO (Rua Aguiar, 36/106 — 20261 — R. Janeiro-RJ) reviglíĝas kaj sin preparas por la Jubilea Jaro, kiam la Nacia Kongreso okazos en la "mirinda urbo". Antaŭen!

**RORAJMO (RR)**

● INFANA E-GRUPO havas novan adreson: C. Postal 62 — 69300 Boa Vista-RR.

**SAN-PAŬLO (SP)**

● LA LAMPIRO (Rua Faustolo, 124 — 05041 São Paulo-SP) — organo de E-Asocio de San-Paŭlo, estas unu el la plej bonaj kaj regulaj periodaĵoj en Brazilo. Gratulon al la Estraro kaj precipe al la Redaktorino Symilde S. Ledon!

● ESPERANTISTA VESPERO (S-ro Aristophio A. A. Filho — R. Tiradentes, 1024 — 13560 São Carlos-SP) okazos en la 1ª/decembro en tiu urbo. Oni petas helpon: fari mallongan prelegon, rakonti spritaĵon deklami poemon, kanti, krii, plori aŭ danci. Almenaŭ partoprenu!

● KULTURA CENTRO DE ESPERANTO (Av. Campos Sales, 890 s/104 — 13100 Campinas-SP) fondiĝis la 26an/oktobro, omaĝe al la unua E-Societo fondita en Brazilo ĝuste en tiu urbo.

● SPIRITISMA CENTRO BATUIRA (R. Estácio de Sá, 193 — 18100 Sorocaba-SP) okazigis kurson kun granda sukceso.

● RADIO CLUBE DE SOROCABA, daŭre prezentas la jam 20-jaran programon ĉiusabate de la 20,15/21ª horo.

● ESPERANTA RONDO DE RADIOMATOROJ — QTR 9ª horo dimanĉe, 7,13 MHz. Celo: disvastigi E-on inter la radioamatoroj. Kontaktoj: OTAVIO PY2 LHQ — C. Postal 71 - 07500 Santa Isabel-SP.

**SUDA RIOGRANDO (RS)**

● E-SOCIETO DE SANTA MARIA (Av. Itaimbé, 664-B Apt. 301 — 97150 Santa Maria - RS) estas ĵus fondita kun brila festo, kiun ĉeestis kiel oficiala gasto de la komuno. Arkt. Ivo Sanguinetti, Prezidanto de Gaŭĉa E-Asocio. La Estraro de la nova societo: Prez.-Ignez S. V. Peixoto, Vic. - Antonio C. Nunes, 1ª Sekr. Elma L. Ressel, 2ª Sekr. - Deci Cipriani, 1ª Kas. - Elia M. M. Freitas, 2ª Kas. - Marion M. Gularte, Bibl. Paulo A. Isaias. Longan vivon.

# DEZIRAS KORESPONDI

F-ino BARBARA NIEDZWIECKA - ul. Kosciuski 8 m.12 - PL 19-300 Ekk - Polland: 25-jara oficistino: literaturo, turismo, moderna muziko.

S-ro JAN REZKA - ul. Szenwalda 2 - PL 96-100 Skierniewice - Pollando. 48ĵara instruisto, inĝeniero-konstr.: turismo, skulptaĵo, folklora muziko.

D-ro EURIPEDES MARTINS DE ARAUJO (Poŝtkesto 464 - BR 38100 Uberaba-MG) estas lernanta komputadon. Iu ajn posedanta kelkan sperton pri utiligo de Eo per komputilo, bonvole skribu.

SONJA MARKOVA SENJ - PK-16 - BG - 5000 Veliko Tirnovo - Bulgario. 35-jara infanpedagogino, pri diversaj temoj, interŝanĝi bildkartojn.

* TOMASZ RUTA - ul. Zawadzkiego 12/20 - 63-100 Śrem - Pollando. 11-jara - pri sporto, turismo, moderna muziko.

# TRIGOŜA UEA–MEMBRECO

UEA proponas al pokopagipovuloj eksperimentan aniĝon laŭ 1/3 de MJ-kotizo dum la periodo 1986 – 1988. Nuntempe ĝi valoras ĉ.2 UDolarojn kaj la membro ricevos ĉ. 100 paĝan depresaĵon de la Jarlibro, la Librokatalogon, Estrarraporton kaj estos plenrajta Individua Membro de UEA. Per tio oni alcelas rimarkindan altiĝon de nia anaro aktiva okaze de la centjariĝo de Esperanto.

Jen bonŝanco kaptenda por altigi la UEA–membraron tiomgrade ke ĝi fariĝos impona antaŭ la speptikuloj. Ĉiu atendu la ĝustan tempon por ĝui la avantaĝon.

# NOVA VOKO

El Brazilio venas nova voko
Al la brazila esperantistaro:
Ke ni kuniĝu kvazaŭ forta roko
Por la starigo de vigla frataro.

For la disputojn! Estu nobla sento
Inter brazilaj la esperantistoj.
Ĉiuj diskutoj en interkonsento
Fariĝos kiel ĉe idealistoj.

Ne plu kvereloj; nun amo kaj fido
Jam regos inter pacaj batalantoj,
Kiuj nur celas al bon' de l' homaro.

Jam estas tempo – feliĉo kaj rido!
Floras Movado por la esperantoj
Venontaj al la Jubile-Centjaro.



## NIA FAMILIO "KRESKEGAS"

Hercilia I. M. Sanches – MS
Izolino Nogueira Cunha – MS
João Gilberto Santos – MS
Luiz Carlos G. Cesar – MS
Maria Fátima C. Pires – SP
Maria Garcia Borges – MS
Marta Eliana H. Rosa – MS
Maria Ribeiro Serra – MS
Sylvio R. Ferigato – DF
Waldir A. Silvestre – DF



## MONDONACOJ ESTAS BONVENAJ

| | |
|---|---|
| Antonio D. Silva – SP | 2.000 |
| Constâncio P. Fonseca – DF | 10.000 |
| Elvira Fontes – SP | 28.000 |
| Erlindo Salzano – SP | 35.000 |
| Euripedes M. Araujo – MG | 5.000 |
| G. A. Silva Velho – SP | 15.000 |
| Geraldo Mattos – PR | 15.000 |
| Hercilia I. M. Sanches – MS | 5.000 |
| Herminia A. Magalhães – MG | 5.000 |
| Hersila Valverde – RJ | 20.000 |
| Ivo Sanguinetti – RS | 35.000 |
| Izolino N. Cunha – MS | 10.000 |
| Jairo P. Resende – MG | 35.000 |
| João Gilberto Santos – MS | 5.000 |
| Joel F. Afonso – SP | 2.000 |
| Lacorday Andrade – SP | 15.000 |
| Manuela S. Lombardi – SP | 2.000 |
| Maria E. C. Rolim – SP | 2.000 |
| Maria G. Borges – MS | 5.000 |
| Marta E. H. Rosa – MS | 5.000 |
| Marta M. Ribeiro – SP | 2.000 |
| Neima C. Adorno – DF | 5.000 |
| Nelson P. Souza – DF | 67.235 |
| Onézimo C. Faria – MG | 50.000 |
| Osmar M. Silva – SP | 2.000 |
| Therezinha C. B. Silva – BA | 10.000 |
| Waldir A. Silvestre – DF | 40.000 |